# Publika raporto pri la KER-ekzamenoj en 2013

En la kvina jaro de la KER-sistemo okazis 6 sesioj, inklude la Duan Tutmondan Ekzamentagon. La komisiitoj agadis en 5 urboj de 5 landoj: Greziljono (FR), Sieber-Herzberg (DE), Rejkjaviko (Islando), Kastelaro (IT) kaj Zaozhuang (CN). Al tiuj nombroj aldoniĝas 24 urboj de 16 landoj kun 70 helpantoj en la loko de la tutmonda ekzamensesio. La urboj estis: Arras 17 - Avinjono 8 - Berlino 7 - Bonaero 7 - Gento 12 - Helsinko 8 - Kalio 8 - Kuritibo 13 - Chaux-de-Fonds 9 - La Roshe-sur-Yon 13 - Limoĝo 12 - Liono 9 - Maceio 11 - Managvo 7 - Malmo 5 - Moskvo 14 - Parizo 9 - San Francisko 7 - Senta 9 - Tecámac 36 - Tijuana 4 - Tokio 5 - Tuluzo 8 - Varsovio 5. La plej multe da kandidatoj varbiĝis denove en la meksika urbo Tecámac. Ni nur kun admiro sekvas la fruktodonan laboron de la loka esperantista teamo.

**Entute en la jaro 2013 aliĝis al la ekzamenoj 321 personoj el 27 landoj.** Dum la pasinta jaro estis pluraj aziaj landoj, el kiuj ni havis kandidatojn, ĉi-jare tio ne estis la kazo. Menciindas tamen Ĉinio, kie dum la landa kongreso estis sukcesa multnombra sesio. Tre strange, unuan fojon en la historio de la ekzamenoj, en lando, kie okazis sesio (Islando, dum UK) neniu kaptis la okazon trapasi la ekzamenon. Do, Islando ankoraŭ ne havas KER-diplomiton.

Estis kelkaj personoj, kiuj ene de tiu ĉi jaro ekzameniĝis plurajn fojojn, ĉu pri la diversaj partoj de la sama nivelo ĉu trapasinte erojn de la diversaj niveloj.

**Laŭ la niveloj estis relativa homogeneco inter la kandidatoj (B1: 127, B2:81 kaj C1:113).** Jen la ciferoj de 2012, (B1: 180, B2:157kaj C1:163), kiam tamen preskaŭ duoble pli da ekzamenoj okazis ol en 2013
Dum la Tutmonda ekzameno ni ebligis al deko da lokoj trapasigi ankaŭ la parolan parton. Danke al tio plurdekoj da personoj kompletigis sian jam akiritan atestilon pri la skriba parto kaj ili trapasis ankaŭ la parolan parton.
La eksperimentaj sesioj kun skajpo tre bone funkciis kaj ni decidis kaj ricevis permeson de ITK daŭrigi tiun formon ankaŭ estontece.

P=parola - S=skriba - K=kompleksa

| KER 2013 Laŭalfabeta | Malsukcesintoj | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Niveloj: ➔ | B1 | | | B2 | | | C1 | | | | |
| Lando🡣 / Tipo ➔ | S | P | K | S | P | K | S | P | K | Personoj | % |
| Argentino | | | | | | | | | | | 0 |
| Belgio | 1 | | | | | | | | | 1 | 8% |
| Brazilo | 8 | | | | | | | | | 8 | 36% |
| Britio | | | | | | | | | | | |
| Ĉinio | 2 | | | | | | | | | 2 | 11% |
| Ĉeĥio | | | | | | | | | | | |
| Finnlando | 1 | | | | | | | | | 1 | 6% |
| Francio | 1 | | | | 1 | | | | | 2 | 2% |
| Germanio | | | | | | | | | | | |
| Hispanio | | | | | | | | | | | |
| Hungario | | | | | | | | | | | |
| Italio | | | | | | | | | | | |
| Japanio | | | | | | | 1 | | | 1 | |
| Kolombio | | | | 1 | | | | | | 1 | 11% |
| Koreio | | | | | | | | | | | |
| Latvio | | | | | | | | | | | |
| Makedonio | | | | | | | | | | | |
| Meksiko | 11 | 1 | | | | | | | | 12 | 29% |
| Nikaragvo | 3 | | | | | | | | | 3 | 43% |
| Norvegio | | | | | | | | | | | |
| Pollando | | | | 1 | | | | | | 1 | 14% |
| Rumanio | | | | | | | | | | | |
| Rusio | | | | | | | | | | | |
| Serbio | | | | | | | | | | | |
| Svedio | | | | | | | | | | | |
| Svislando | | | | | | | | | | | |
| Usono | | | | | | | | | | | |
| **Laŭtipe kaj nivele** | 27 | 1 | 0 | 2 | 1 | 0 | 1 | | 0 | 32 | |
| | 26% | 8% | 0% | 4% | 8% | 0% | 2% | 0% | 0% | | |
| **Sume laŭnivele** | | 28 | | | 3 | | | 1 | | | |
| | | 28% | | | 4% | | | 1% | | | 10% |

**Pri la Tutmonda Ekzamentago nepre menciindas du aliaj faktoroj.**
Por la organizado necesas envolvi aŭ pli da personoj (ĉar Katalin Kovats tutsola ne kapablas kaj regisori kaj ĉiun administran parton fari, aŭ necesas investi monon por realigi retan spacon por la administraj laboroj. Plano pretas, programisto pretigas la financan proponon, kaj espereble UEA povos financi la retan KER-ejon.
La dua punkto estas ke analizante la kvaliton de la ekzamenrezultoj rimarkeblas, ke en kelkaj lokoj estas okulfrape altaj la malsukcesoj. Tiuj koncernas preskaŭ nur la nivelon B1 kaj nur kelkajn ekzamenlokojn, kie la gvidantoj ne bone taksis la nivelon de siaj kandidatoj/kursanoj kaj lasis/instigis tiujn ekzameniĝi.
Ĉar tiuj lokoj estas en B-landoj, kun malaltaj ekzamenkotizoj tio ĉiam vane perdigas monon al UEA. Aliflanke en multaj kazoj la kandidatoj ne mem aŭ nur parte financas siajn ekzamenojn, estonte necesas eĉ pli strikte averti la organizantojn/kursgvidantojn kaj peti ilin pri severa kaj plurfoja okazigo de provekzamenoj, solvado de specimenoj, organizado de trejnadoj, kaj zorgema apliko de la subvencisistemo.

*(La tabelon pri la sukcesoj vidu fine de la dokumento.)*

| 2013 | B1 | Malsukceso | B2 | Malsukceso | C1 | Malsukceso | Sume | Malsukceso |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | personoj | personoj - % | personoj | personoj - % | personoj | personoj - % | personoj | personoj - % |
| Parola | 12 | 1 - 2 % | 12 | 1 - 8% | 21 | 0 -0% | 45 | 2 - 4% |
| Skriba | 105 | 27 - 26% | 46 | 2 - 4% | 64 | 1- 2% | 215 | 30 - 14 % |
| Kompleks | 10 | 0 - 0% | 23 | 0 - 0% | 28 | 0 - 0% | 61 | 0 - 0% |
| **Sume** | **127** | **28 - 22%** | **81** | **3 - 4%** | **113** | **1 - 1%** | **321** | **32 - 10%** |


En la ekzameniĝo ankaŭ ĉi-jare la plej aktivaj estis francoj (100/98), ilin sekvis meksikanoj (41/29) kaj ĉinoj (19/17).
La plej multnombrajn kandidatojn donis tiuj landoj (escepte Islandon), kie okazis ekzamensesio.

**Ranglisto laŭ sukcesintaj kandidatoj ***

| Pozicio | Lando | Aliĝis | Sukcesis | Sukcesis | Poentoj |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 | Francio | 100 | 98 | 98% | 276 |
| 2 | Meksiko | 41 | 29 | 71% | 44 |
| 3 ĝis 4 | Ĉinio | 19 | 17 | 89% | 22 |
| 3 ĝis 4 | Rusio | 17 | 17 | 100% | 31 |
| 5 | Finnlando | 17 | 16 | 94% | 45 |
| 6 | Brazilo | 22 | 14 | 64% | 27 |
| 7 ĝis 8 | Belgio | 12 | 11 | 92% | 23 |
| 7 ĝis 8 | Germanio | 11 | 11 | 100% | 41 |
| 9 | Svislando | 10 | 10 | 100% | 19 |
| 10 ĝis11 | Kolombio | 9 | 8 | 89% | 20 |
| 10 ĝis11 | Usono | 8 | 8 | 100% | 27 |
| 12 ĝis13 | Argentino | 7 | 7 | 100% | 16 |
| 12 ĝis13 | Serbio | 7 | 7 | 100% | 22 |
| 14 ĝis15 | Japanio | 7 | 6 | 86% | 21 |
| 14 ĝis15 | Pollando | 7 | 6 | 86% | 23 |
| 16 | Svedio | 5 | 5 | 100% | 6 |
| 17 ĝis18 | Nikaragvo | 7 | 4 | 57% | 6 |
| 17 ĝis18 | Italio | 4 | 4 | 100% | 16 |
| 19 | Koreio | 2 | 2 | 100% | 7 |
| 20 ĝis 27 | Britio | 1 | 1 | 100% | 4 |
| 21 ĝis 27 | Ĉeĥio | 1 | 1 | 100% | 6 |
| 21 ĝis 27 | Hispanio | 2 | 2 | 100% | 8 |
| 21 ĝis 27 | Hungario | 1 | 1 | 100% | 2 |
| 21 ĝis 27 | Latvio | 1 | 1 | 100% | 3 |
| 21 ĝis 27 | Makedonio | 1 | 1 | 100% | 4 |
| 21 ĝis 27 | Norvegio | 1 | 1 | 100% | 6 |
| 21 ĝis 27 | Rumanio | 1 | 1 | 100% | 6 |
| | | **321** | **289** | | **731** |

en tiuj landoj okazos sesio

**Ranglisto laŭ sukcesintaj kandidatoj ***




Pretiĝis statistiko ankaŭ laŭ la valoro de la ekzamenoj. La kalkulado de poentoj okazis tiel, ke la ekzameno laŭ tipoj je B1-nivelo valoras 1, je B2 valoras 2 kaj je C1-nivelo 3 poentojn. Sekve: unu B1 kompleksa valoras 2 poentojn, ktp.
Laŭ tiu kalkulmaniero tiuj landoj aperas en la komenco de la listo, kiuj havas pli da altnivelaj kandidatoj.


Estas interese, ke francoj – lando, kies landa ekzamensistemo estas la plej riĉa kaj ellaborita – kun tre granda entuziasmo partoprenas la KER-ekzamenojn. Verŝajne pozitive influas tion la fakto, ke la membroj de la landa estaro preskaŭ senespecepte jam posedas KER-atestilon kaj la asocio subvencias la ekzamenkandidatojn.
Necesus stimuli ĉiujn landajn asociojn je la samo, nome, ke la funkciuloj trapasu ekzamenojn, por kandidatoj de movadaj postenoj donu avantaĝojn se ili havas atestilojn pri sia lingvoscio, okazu konkurado, estu kampanjoj, estu organizita dum landaj kongresoj ekzamenoj, estu trejnadoj, unuvorte la KER-ekzamenoj apartenu firme al la landaj agadplanoj kaj lingvolernado.

**Ranglisto laŭ la poentoj**

| Pozicio | Lando | Poentoj | Sukcesis |
|---|---|---|---|
| 1 | Francio | 276 | 98 |
| 2 | Finnlando | 45 | 16 |
| 3 | Meksiko | 44 | 29 |
| 4 | Germanio | 41 | 11 |
| 5 | Ruslando | 31 | 17 |
| 6-7 | Brazilo | 27 | 14 |
| 6-7 | Usono | 27 | 8 |
| 8 ĝis 9 | Belgio | 23 | 11 |
| 8 ĝis 9 | Pollando | 23 | 6 |
| 10 ĝis 11 | Ĉinio | 22 | 17 |
| 11 ĝis 12 | Serbio | 22 | 7 |
| 12 | Japanio | 21 | 6 |
| 13 | Kolombio | 20 | 8 |
| 14 | Svislando | 19 | 10 |
| 15 ĝis16 | Argentino | 16 | 7 |
| 15 ĝis16 | Italio | 16 | 4 |
| 17 | Hispanio | 8 | 2 |
| 18 | Koreio | 7 | 2 |
| 19 ĝis23 | Svedio | 6 | 5 |
| 19 ĝis23 | Nikaragvo | 6 | 4 |
| 19 ĝis23 | Ĉeĥio | 6 | 1 |
| 19 ĝis23 | Norvegio | 6 | 1 |
| 19 ĝis23 | Rumanio | 6 | 1 |
| 24 ĝis 25 | Britio | 4 | 1 |
| 24 ĝis 25 | Makedonio | 4 | 1 |
| 26 | Latvio | 3 | 1 |
| 27 | Hungario | 2 | 1 |
| | | **731** | **289** |

en tiuj landoj okazos sesio

**Ranglisto laŭ la poentoj KER-2013**



Ĝis la fino de 2013 okazis entute 37 sesioj en 30 landoj kun 1346 ekzamenokazoj. La partoprenintoj venis el 61 landoj. Estis disdonitaj 1250 atestiloj. (Tutpreciza kaj detala statistiko pretos meze de januaro 2014).

| Nivelo / Jaro | B1 | B2 | C1 | Sume |
|---|---|---|---|---|
| 2009 | 17 | 25 | 84 | **126** |
| 2010 | 35 | 48 | 75 | **158** |
| 2011 | 42 | 72 | 127 | **241** |
| 2012 | **180** | **157** | **163** | **500** |
| 2013 | **127** | **81** | **113** | **320** |
| **Sume** | **401** | **383** | **562** | **1346** |

***Landa ranglisto*** *laŭ ekzamenokazoj, sen analizo de sukcesoj kaj malsukcesoj aŭ sen ekzamentipo kaj partoj.*

| | Lando | Sumo |
|---|---|---|
| 1. | Francio | 351 |
| 2. | Brazilo | 174 |
| 3. | Rusio | 104 |
| 4. | Meksiko | 94 |
| 5. | Germanio | 60 |
| 6. | Italio | 53 |

*La 284 ekzameniĝojn de la unuaj du jaroj ni preskaŭ duobligis en 2011 kun 241 ekzamenokazoj.*
*En 2012 denove okazis preskaŭ duobligo, estis 500 ekzamenokazoj, sume ni havis 1025 ekzameniĝintojn.*
*Tio inkludas miksitajn nivelojn kaj la samajn personojn plurfoje, se ili plurfoje trapasis ekzamenon.*

*En 2013 observeblas refalo. Edukado.net estis ĝis nun preskaŭ la sola varbanto por la ekzamenoj. La fontoj de kandidatoj estis ties membraro, kiu tamen ne kreskas tiom rapide, ke ĉiujare troveblu el tiu cirklo centoj da novaj kandidatoj.*
***UEA,*** *ILEI kaj la landaj asocioj devus engaĝiĝi por stimuli la membrojn ekzameniĝi. La landaj sekcioj devus plani okazigi sesiojn en novaj lokoj, por nova publiko. La nova UEA-estraro kaj la strategia plano donas esperon.*
*Necesus ekagi en landoj, kiuj en la unuaj 6 jaroj restis indiferentaj al la ekzamenkampanjoj: ekz. Norvegio, Britio, Slovenio, Ĉeĥio, Rumanio, Islando, Kanado, Aŭstralio ktp…*

La ekzamenkomisiono ankaŭ por 2014 antaŭvidas plurajn eventojn. Jam nun estas lanĉitaj sesioj:

- en januaro en Belgio kaj Brazilo,
- printempe en Greziljono kaj dum la germana kongreso.
- estas traktado pri ekzameno dum la skota kongreso, en Rio de Janiero kaj dum la hispana kongreso
- SES ankaŭ en 2014 petis ekzameneblon
- la Tria Tutmonda Ekzamtago okazos la 17an de majo, denove en pluraj lokoj kun parolaj sesioj.

Ĉio ĉi postulas grandan organizadon kaj bonan kunlaboron, kiun kunordigos- tra edukado.net – Katalin Kovats, estro de la ekzamenkomisiono de UEA.
Pliajn informojn pri la ekzamenoj trovu en la paĝaro www.edukado.net aŭ petu ĉe ker-ekzamenoj@edukado.net
.

Katalin Kováts, gvidanto de la ekzamenkomisiono de UEA.

## KER 2013 Sukcesintoj
### Laŭalfabeta

| Niveloj: → | B1 | | | B2 | | | C1 | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Lando↓ / Tipo → | S | P | K | S | P | K | S | P | K | Poentoj | Personoj |
| Argentino | 1 | | | 3 | | | 3 | | | 16 | 7 |
| Belgio | 3 | | | 4 | | | 4 | | | 23 | 11 |
| Brazilo | 6 | | | 3 | | | 5 | | | 27 | 14 |
| Britio | | | | | | 1 | | | | 4 | 1 |
| Ĉinio | 14 | | | 1 | | | 2 | | | 22 | 17 |
| Ĉeĥio | | | | | | | | | 1 | 6 | 1 |
| Finnlando | 2 | | | 2 | 1 | 1 | 4 | 5 | 1 | 45 | 16 |
| Francio | 13 | 5 | 8 | 20 | 7 | 17 | 9 | 7 | 12 | 276 | 98 |
| Germanio | 2 | | | | | | 5 | | 4 | 41 | 11 |
| Hispanio | | | | 1 | | | | | 1 | 8 | 2 |
| Hungario | | | | 1 | | | | | | 2 | 1 |
| Italio | | | | | | 1 | 1 | 1 | 1 | 16 | 4 |
| Japanio | | | | | | | 5 | | 1 | 21 | 6 |
| Kolombio | 2 | | | 1 | | 1 | 4 | | | 20 | 8 |
| Koreio | | | | | | 1 | 1 | | | 7 | 2 |
| Latvio | | | | | | | | 1 | | 3 | 1 |
| Makedonio | | | | | | 1 | | | | 4 | 1 |
| Meksiko | 13 | 6 | 2 | 1 | 2 | | 1 | 4 | | 44 | 29 |
| Nikaragvo | 3 | | | | | | 1 | | | 6 | 4 |
| Norvegio | | | | | | | | | 1 | 6 | 1 |
| Pollando | | | | 1 | | | 3 | | 2 | 23 | 6 |
| Rumanio | | | | | | | | | 1 | 6 | 1 |
| Rusio | 10 | | | 3 | | | 3 | | 1 | 31 | 17 |
| Serbio | | | | 2 | | | 4 | | 1 | 22 | 7 |
| Svedio | 4 | | | 1 | | | | | | 6 | 5 |
| Svislando | 5 | | | | 1 | | 2 | 2 | | 19 | 10 |
| Usono | | | | | | | 6 | 1 | 1 | 27 | 8 |
| Laŭtipe kaj nivele | 78 | 11 | 10 | 44 | 11 | 23 | 63 | 21 | 28 | 731 | 289 |
| Sume laŭnivele | | 99 | | | 78 | | | 112 | | | 289 |

**P=parola - S=skriba - K=kompleksa**

| | Alfabela listo | KER-2013 | |
|---|---|---|---|
| | Lando | Sukcesintoj | Poentoj |
| 1 | Argentino | 7 | 16 |
| 2 | Belgio | 11 | 23 |
| 3 | Brazilo | 14 | 27 |
| 4 | Britio | 1 | 4 |
| 5 | Ĉeĥio | 1 | 6 |
| 6 | Ĉinio | 17 | 22 |
| 7 | Finnlando | 16 | 45 |
| 8 | Francio | 98 | 276 |
| 9 | Germanio | 11 | 41 |
| 10 | Hispanio | 2 | 8 |
| 11 | Hungario | 1 | 2 |
| 12 | Italio | 4 | 16 |
| 13 | Japanio | 6 | 21 |
| 14 | Kolombio | 8 | 20 |
| 15 | Koreio | 2 | 7 |
| 16 | Latvio | 1 | 3 |
| 17 | Makedonio | 1 | 4 |
| 18 | Meksiko | 29 | 44 |
| 19 | Nikaravuo | 4 | 6 |
| 20 | Norvegio | 1 | 6 |
| 21 | Pollando | 6 | 23 |
| 22 | Rumanio | 1 | 6 |
| 23 | Ruslando | 17 | 31 |
| 24 | Serbio | 7 | 22 |
| 25 | Svedio | 5 | 6 |
| 26 | Svislando | 10 | 19 |
| 27 | Usono | 8 | 27 |
| | | 289 | 731 |

| KER-2013 | | | |
|---|---|---|---|
| Ranglisto laŭ poentoj* | | Poentoj | Sukcesintoj |
| 1 | Francio | 276 | 98 |
| 2 | Finnlando | 45 | 16 |
| 3 | Meksiko | 44 | 29 |
| 4 | Germanio | 41 | 11 |
| 5 | Ruslando | 31 | 17 |
| 6-7 | Brazilo | 27 | 14 |
| 6-7 | Usono | 27 | 8 |
| 8 ĝis 9 | Belgio | 23 | 11 |
| 8 ĝis 9 | Pollando | 23 | 6 |
| 10 ĝis 11 | Ĉinio | 22 | 17 |
| 11 ĝis 12 | Serbio | 22 | 7 |
| 12 | Japanio | 21 | 6 |
| 13 | Kolombio | 20 | 8 |
| 14 | Svislando | 19 | 10 |
| 15 ĝis16 | Argentino | 16 | 7 |
| 15 ĝis16 | Italio | 16 | 4 |
| 17 | Hispanio | 8 | 2 |
| 18 | Koreio | 7 | 2 |
| 19 ĝis23 | Svedio | 6 | 5 |
| 19 ĝis23 | Nikaragvo | 6 | 4 |
| 19 ĝis23 | Ĉeĥio | 6 | 1 |
| 19 ĝis23 | Norvegio | 6 | 1 |
| 19 ĝis23 | Rumanio | 6 | 1 |
| 24 ĝis 25 | Britio | 4 | 1 |
| 24 ĝis 25 | Makedonio | 4 | 1 |
| 26 | Latvio | 3 | 1 |
| 27 | Hungario | 2 | 1 |
| | | 731 | 289 |

| | KER 2013 | Listo laŭ laŭ sukcesintoj | |
|---|---|---|---|
| | Lando | Sukcesintoj | Poentoj |
| 1 | Francio | 98 | 276 |
| 2 | Meksiko | 29 | 44 |
| 3 ĝis 4 | Ĉinio | 17 | 22 |
| 3 ĝis 4 | Ruslando | 17 | 31 |
| 5 | Finnlando | 16 | 45 |
| 6 | Brazilo | 14 | 27 |
| 7 ĝis 8 | Belgio | 11 | 23 |
| 7 ĝis 8 | Germanio | 11 | 41 |
| 9 | Svislando | 10 | 19 |
| 10 ĝis 11 | Kolombio | 8 | 20 |
| 10 ĝis 11 | Usono | 8 | 27 |
| 12 ĝis 13 | Argentino | 7 | 16 |
| 12 ĝis 13 | Serbio | 7 | 22 |
| 14 ĝis 15 | Japanio | 6 | 21 |
| 14 ĝis 15 | Pollando | 6 | 23 |
| 16 | Svedio | 5 | 6 |
| 17 ĝis 18 | Italio | 4 | 16 |
| 17 ĝis 18 | Nikaragvo | 4 | 6 |
| 19 ĝis 20 | Koreio | 2 | 7 |
| 19 ĝis 20 | Hispanio | 2 | 8 |
| 21 ĝis 27 | Britio | 1 | 4 |
| 21 ĝis 27 | Ĉeĥio | 1 | 6 |
| 21 ĝis 27 | Hungario | 1 | 2 |
| 21 ĝis 27 | Latvio | 1 | 3 |
| 21 ĝis 27 | Makedonio | 1 | 4 |
| 21 ĝis 27 | Norvegio | 1 | 6 |
| 21 ĝis 27 | Rumanio | 1 | 6 |
| | | 289 | 731 |

(dark green) landoj kie okazis sesio

* Poentoj: C1 Kompleksa 6, B2 kompleksa 4, B1 kompleksa 2. La skriba aŭ parola aparte valoras duonon de la poentoj de la koncerna nivelo.